Manfred Hausmann,

# La perloj

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Vi, kvankam scias vi, ke ja ligita
kun man' kaj kor' al edzo estas mi,[2]
de vi al mi sekrete alsendita
jen estas tiu perl-par' ĉi.

Freneza devas esti vi - mi devas
konfesi, ke feliĉon sentas mi
la perlojn rigardante - Ĉu mi revas? -
Ĉu vera estas tio ĉi?

Kaj nia dom' en sia olda brilo
sin levas ĉe la reĝa ĝardenar'.
Jen mia edz' kun sia batalilo,
la estro de l' reĝ-gardistar'.

Kaj kion ankaŭ pensis menso via,
dum vi al mi ofertis tion ĉi,
Mi ja promesis, ke ĝis morto mia
fidela volas resti mi.

Reprenu la donacon senespere!
Se iam estus renkontintaj ni,
- sed tion povis ne okazi vere -
ja estus eble via mi.

*Traduko de la Germana poemo "Die Perlen" de* MANFRED HAUSMANN *(∗1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04).*

*Arg-888-1770 (2013-06-04 23:53:48)*

*Pri la poeto vidu ankau la retejon* `http://history.cultural-china.com/en/59History8512.html` .

[2] aŭ: al edzo, ho sinjoro, estas mi,